

esperanto USA

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1991(6)

Making News This Issue

Children Around the World

For the last several years a San Diego-based organization has been using Esperanto as a means of getting children from different countries in contact with each other. In this issue we hear from its president Charlotte Kohrs.

See Page 3

San Francisco State

SFSU's Summer Esperanto Workshop was again a success. We have a direct report from Reginald Jaderstrom, one of this year's students who will be next year's head instructor.

See Page 7

Gifted and Talented

Prof. Ron Glossop shares with us his experiences and those of the children of *Fondaĵo Talento* at this year's Ninth World Congress for Gifted and Talented Children in The Hague.

See Page 8

In This Issue:

The C.O.: Learning Esperanto 5

Julio Baghy at 100 13

Esperanto At the University of Hartford 16

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

Teaching Esperanto

Proklamo de Voss

Akceptita en la 25a Jubilea Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Voss, Norvegio, 3an-8a de Aŭgusto 1991

Esperanto kiel funkcia lingvo

En la disvastiga laboro, unuarange gravas emfazi, ke Esperanto estas jam funkcia lingvo kun la propraj historio, kulturo kaj kulturportaj valoroj kaj strebi, ke ĝi ĝuu sur plej diversaj kampoj samajn rangon, rajton, rimedojn kaj prestiĝon kiel etna lingvo de simila disvastiĝinteco, kaj krome, ke ĝi estu estimata pro sia unika tutmonda rolo kaj sia potenciala kontribuo al la demokratiigo de la komunikado.

Esperanto kaj strategio

Kerne al la strategia debato estas malharmonio inter desupremaj kaj desubemaj agantoj. Evidentas unuflanke, ke klopodoj devigi la uzon de Esperanto al iu nekonvinkita popolo ne nur fiaskos, sed estas kontraŭ la etika bazo de la lingvo. Klaras aliflanke, ke dum desuba laboro konstante necesas, de si mem ĝi malverŝajne kondukos al signifa kresko de la lingvo aŭ ĝia komunumo. Pli saĝa strategio estas la kombino de ambaŭ vojoj per zorge elektitaj projektoj, tiel ke la desupre akiritaj decidoj kaj permesoj renkontu desube kreitan deziron aŭ bezonon.

La celo al kvalito estas laŭdinda, sed necesas konstati, ke la kvalito plej ofte fontas el kvanto, kaj tiun kvanton povas krei la instruado, kadre de kiu apartan gravecon havas la adekvata kaj laŭeble oficiala trejnado de instruistoj.

Esperanto kaj naciaj lingvoj

Esperanto utilas por protekti la rajtojn de minoritataj lingvoj; la esperantistoj oponu nenion specifan lingvon—naciaj lingvoj

estas respektendaj, sendepende de grandeco. Esperantistoj tamen malkontentu pri la uzo de naciaj lingvoj por transnaciaj celoj, precipe kiam tio diskriminacias kontraŭ neparolantoj de tiuj lingvoj kaj minacas la pluvivon de minoritataj lingvoj kaj kulturoj. Vanas batali rekte kontraŭ difinitaj grandaj lingvoj, sed necesas malkonstrui la mitojn, kiuj subtenas ilian misuzon, zorgante fari tion per pravigeblaj argumentoj kaj ne per niaj propraj mitoj.

Esperanto—ĝia destino

La tradicia termino "fina venko" kun siaj militecaj subsignifoj transformiĝu al konstanta agado por ebligi la uzon de Esperanto inter tiu kreskanta nombro de personoj celantaj transnacion komunikadon. La plukreo de aŭtonoma Esperanta kulturo estas valora, necesa, sed ne sufiĉa antaŭkondiĉo por tiu strebo; sekve konflikto inter kultur-flegemaj kaj finvenkemaj esperantistoj estas transpontebla—ili povas trovi abundajn terenojn, kie utile kunlabori.

Signifa kvanta kaj kvalita salto en la uzo de Esperanto ne okazos:

—*sole* per la klopodoj de la nunaj parolantoj, kiuj havas nek la rimedojn nek la potencon tion solaj realigi;

—*sen* la klopodoj de la nunaj esperantistoj teni la lingvon evoluanta, la komunumon vivanta, la aplikeblojn vastiĝantaj, ĝis potencialaj aplikistoj kun siaj lertoj kaj rimedoj malkovros kaj ekspluatos la lingvon.

Kvankam naivaj revoj pri baldaŭ "fina venko" povas naski frustrajn, certe iel forigendajn, estus tamen grava eraro elimini deziron pri signifa disvastiga sukceso, ĉar tion farinte, la komunumo riskus nenion rimarki, se subite kaj neatendite maturiĝus kondiĉoj, kiuj malfermus la vojon al tio.

La nuna tasko estas krei tiujn antaŭkondiĉojn, kies manko aŭ malforto bremsus Esperanton en la koncerna momento ĉe transiro al tiu vast-skala uzado.

EDITORIAL

LA DUA KRURO

Mi opinias, ke estis Ivo Lapenna, kiu, antaŭ multaj jaroj, indikis, ke la fina sukceso de la Esperanto-movado similas tabureton kiu sidas sur tri kruroj. Tiuj tri kruroj estas: Informado; Instruado; Uzado. Homoj unue eksciis pri Esperanto; poste ili povu lerni la lingvon; fine, la lingvo estu utila por ili, por doni al ili kialon por lerni ĝin. Mi nun volas diri kelkajn vortojn pri la instruado de Esperanto—ĉefe pro tio, ke granda parto de ĉi tiu numero estas dediĉita al tiu temo.

Je diversaj fojoj en diversaj landoj, Esperanto ricevis oficialan atenton en la lerneja sistemo. La ĉinoj estas eble la plej entuziasmaj pri la lingvo; oficiala subtenado por Esperanto komenciĝis ĉe Cai Juanpei, Ministro de Klerigado sub Sun Jatsen post la renverso de la antikva Dinastio Ĉing antaŭ la Unua Mondmilito. Inter aliaj landoj hodiaŭ proponantaj Esperanton je iu nivelo en la nacia lernejo-sistemo troviĝas Hungario kaj Bulgario. Oni tamen devas agnoski, ke, entute, la tutmonda instruado de Esperanto kiel fremdlingvo restas ie sub tiu de la itala aŭ la bengala. Komparu tion kun la angla, kiu estas instruata en preskaŭ ĉiu lando, pliofte kiel unua fremdlingvo. Estas surprize, ke Esperanto estas fakte tiel sukcesa, malgraŭ la manko de ricevata atento fare de instruistoj.

Aŭ eble ne. Esperanto havas difinitajn avantaĝojn, kiuj mankas al aliaj lingvoj; ĉefa inter tiuj estas tio, ke ĝi estas relative facile lernebla. Multaj kompetentaj esperantistoj meminstrue lernis la lingvon—el libro. La aspiranta parolanto de la angla kiel dua lingvo nur malofte sukcesas fari tion. Pluraj eksperimentoj jam montris, ke Esperanto estas pli rapide lernebla ol iu alia lingvo. Cetere, tia lingvo kia la angla fariĝas des pli malfacila, ju pli longe oni studas ĝin; aliflanke, ĉe Esperanto la progresanto devas nur akiri vortprovizon.

Ankaŭ ŝajnas esti ia entuziasmo pri lernado de la lingvo; tion, eble, ne sufiĉe rekonas la esperantistoj. Ĉu ni surpriziĝu pri tio, ke la unua tutnacia televida kurso de preskaŭ nekonata Esperanto en Ĉinio allogis pli-malpli duone tiom da homoj kiel simila kurso de la angla, lingvo vaste konata, vaste propagandata, kaj vaste

instruata en tiu giganta lando? Kaj pli ol la franca, lingvo historie supozata grava internacia lingvo?

Do pripensu la eblecojn realigeblajn se oni povus iamaniere movi Esperanton en la lernejojn.

Esperantistoj ĉiam renkontas kontraŭstaron kontraŭ tiu ideo. Propono por instigi al ŝtatmembroj de la Ligo de Nacioj enkonduki Esperanton en siajn lernejojn estis rifuzita en komitato fare de franca registaro, kiu jam malpermesis la instruadon de Esperanto en francaj lernejoj; argumentoj kovris la gamon de la pseŭdintelektaj ĝis tiu pli honesta de Julien Luchaire: “Ĉu ordinarioj do rajtu interkomunikadi trans naciaj limoj?” La 1954a rezolucio de UNESKO “favora” al Esperanto, enhavanta kvar punktojn, komence enhavis kvinan, kiu rilatis al la lerneja instruado de Esperanto; oni elstrekis tiun paragrafon antaŭ balotado.

Ekzistas tamen multaj esperantistoj, kiuj daŭre laboradas por enkonduko de Esperanto en lernejoj je diversaj niveloj. Mia propra persona sperto rilatis al s-ino Karen Mason, esperantisto el la Orientgolfaj regionoj de Kalifornio, kiu antaŭ kelkaj jaroj entreprenis konvinki la aŭtoritatojn ĉe la Universitato de Kalifornio (Berklia) enkonduki Esperanton tra flanka pordo, per la DECal (Demokracia Edukado ĉe Cal) programo. Tiuj kursoj jam daŭras pli-malpli sep jarojn, sub aŭspicio de la Lingvistika Fakultato; instruistoj por la nuna semestro estas Charles Galvin de San Francisco kaj Prof. Ĉien Mingĉi de Sanhajo.

Kiel vi povas konstati el ĉi tiu numero, aliaj celas alimaniere instrui Esperanton. En ĉi tiu numero vi trovos raporton de Sandiegano Charlotte Kohrs pri la Organizaĵo “Infanoj ĉirkaŭ la mondo”, kiun ŝi fondis antaŭ pluraj jaroj kaj kies ĉefmotoro ŝi restas. IĈLM instruas Esperanton al lernantoj kaj helpas ilin kontakti similajn grupojn en aliaj landoj, helpas krei lernhelpilojn pri Esperanto, kaj helpas al la infanoj aperigi novaĵleteron en Esperanto.

Ron Glossop jam delonge laboras pri la instruado de Esperanto al talentaj infanoj. En ĉi tiu jaro li sukcesis aranĝi, ke infanoj

el la hungara Fondaĵo Talento prezentiĝu antaŭ la Naŭa Mondkongreso por Kapablaj kaj Talentaj Infanoj en Hago, Nederlando; pri tiu afero vi trovos raporton aliloke en ĉi tiu numero.

Por malpli junaj studentoj, la someraj Esperanto-kursoj ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato okazas ĉiujare ekde 1970. Tiuj kursoj estas tutmonde konataj, kaj allogas partoprenantojn el diversaj mondopartoj; ĉisomere, ekzemple, partoprenis instruistoj el Usono, Koreio kaj Francio, kaj studentoj el pluraj landoj. Vi trovos raporton pri la kursoj de partopreninto Reginald Jaderstrom, kiu estros la instruistaron, kun vizitantaj profesoroj el Pollando kaj Hungario, ĉe la venontjaraj kursoj.

Fine, sur la frontpaĝo, vi trovos la “Proklamon de Voss”, kiu elvenis el la ĉijara Kongreso de ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. La Proklamo de Voss diskutas ne la instruadon de Esperanto, sed la starigon de medio, kaj en kaj ekster la Esperanto-movado, en kiu instruado de Esperanto povos estontece pli vaste okazi.

Mi esperas, ke plaĉos al vi legi ĉi tiun priinstruadan numeron de *Esperanto U.S.A.*

The ELNA Board of Directors recently decided that the 40th anniversary ELNA Congress would be held next summer in the San Francisco Bay Area. More on this in future issues.

The Board has also decided to install a toll-free phone number in the ELNA Central Office. This number is (800) 828-5944. Members of ELNA are requested to advertise the existence of this number to those interested in finding out about Esperanto. Because of the cost to ELNA (22 cents per minute of connect time), the number will be used *only* for information requestors, and will be answered by an answering machine, to tell the caller something about Esperanto and get his/her address for a packet of information. Members of ELNA should continue to communicate with the Central Office either by mail or through the office's (510) number.

Don Harlow

INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO: HISTORY, GOALS, ACHIEVEMENTS, PLANS

by Charlotte Kohrs

[Charlotte Kohrs is the founder and President of the organization Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, which has become widely known, as its name suggests, around the world.]

Four years ago, in May 1987, some Esperantists in San Diego, California, formed the non-profit cooperative CHILDREN AROUND THE WORLD (CATW), soon known internationally as INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO (ICLM). (See page 116 in the 1991 *Jarlibro* of UEA.)

From the first, CATW has aimed to widen the circle of those who work for Esperanto to include the creative skills, energies and/or financial support of people who are dedicated to the idea of a neutral, international second language, but who are not necessarily expert Esperantists—either because they do not learn languages easily, or because they do not now have the time or do not wish to learn the language.

Therefore, CATW has welcomed both Esperantists and non-Esperantists; and some of our most active and creative members, including several members of our Board of Directors, are not fluent Esperantists.

Our goals: 1. To help introduce Esperanto to children in the United States and other countries;

2. With the help of Esperantists around the world, who will act as a language bridge between children who don't know much Esperanto, to help children communicate, work together on projects, and learn about each others' customs and countries without a language barrier;

3. To create and offer free or inexpensive teaching materials to those who are teaching Esperanto to children; and to exchange materials.

Here are our publications—the basis of other activities. They have been financed chiefly by donations from individuals; also by grants: \$1425 from the Eduka Fondaĵo "Carson" in 1987; \$300 from the American Association of Teachers of Esperanto (1991); and \$100 from the Esperanto Association of Los Angeles (1990).

1987 *LET'S TALK AROUND THE WORLD*: a step-by-step guide, with eight lesson plans, for introducing Esperanto in school classrooms. Sold at cost, \$3.85, postpaid. English and Esperanto.

1987-1991 Four issues of *LA REVUO*

DE INFANOJ ĈIRKAŬ LA MONDO (issue #5 to be published in July 1991). Each issue includes an Esperanto lesson with parallel English translations, drawings, short essays, letters, puzzles by children. Three issues include a "Volas Korespondi" page, giving names of teachers whose classes wish to correspond. The first four issues include contributions from children in 25 cities in 13 countries. Free to members and to Esperantists who are teaching groups of children.

1987, 1988 Two videos. Theme: CHILDREN TEACH EACH OTHER ESPERANTO. Sold at approximate cost: \$6.35 each postpaid.

1988; 1990 Song cassette (1988): *Kantu Esperante kun Janico kaj Johano: 12 Konversaciaj Kantoj Por Komencantoj*. Eleven of the twelve songs are original songs that, step by step, illustrate basic grammar and give practice in common conversational sentence patterns. \$7.00 from ELNA or CATW, including an Esperanto-English "lernolibreto" (1990) based on the songs. Illustrated by children. The Libroservo of UEA sells the cassette and will sell the "tutesperanta lernolibreto" (publication date: July 1991.)

1989 Two "bildlibretoj": *Bonvenon, Amiko, Ĉu Vi Parolas Esperanton?* and *Bonvenon kaj Saluton! Parolu Esperanton Kun Ni*. Created, with some help from adults, by the children in the 3rd/4th grade class of s-ino Carolyn Goodfellow, Freese School, San Diego. The goal: to give children booklets that they can use to introduce Esperanto to other children and to adult relatives and friends.

1991 *NI ESPLORU LA MONDON! Libreto Unu*: a booklet with questions and answers about the geography of eight countries, written, with help from Esperantists, by children in the countries. Includes flags, maps, games and a geography word list: "Gravaj Vortoj Kaj Frazoj Pri Mondgeografio." Illustrated by Children. \$1.00 from ELNA or CATW. Also sold by the Libroservo of UEA.

We published *Ni Esploru La Mondon* partly in order to demonstrate to school personnel that through Esperanto children in many countries can work together to create a booklet that is useful in learning a school subject. But it is not just an interesting booklet with a few geographical facts. It

is a tool teachers can use in any class (adults or children) to stimulate students to speak Esperanto within the first two months of learning.

1991 Video: Theme: CHILDREN TEACH EACH OTHER ESPERANTO. 1) In four short lessons, four groups of children in a 5th/6th grade class introduce Esperanto in dialogs and games based on world geography. 2) In seven short lessons, a 3rd/4th grade class introduces Esperanto; each lesson based on a different song of our song cassette. \$6.50 postpaid to those who teach or plan to teach Esperanto to children; or will use it to introduce others to Esperanto. [This video is more carefully planned and helpful than our earlier videos. Included with the video is *Learn Esperanto With Dialogs and Songs*, guidelines for introducing Esperanto with the seven songs.]

What have we achieved and learned in our first four years?

1. In the past four years, in San Diego I have introduced Esperanto to several hundred children in elementary school classrooms (grades 3 through 6), usually one hour weekly, teaching the whole class and the teacher. Here are some of the things I've learned:

- a) Children respond at once to the idea of an international second language.
- b) They are delighted that from the very first lesson they can speak Esperanto. They love the language itself. They love the fact that it is regular, and they are excited because it is made up of words from many different languages.
- c) Partly because of continued successes, they develop a very positive attitude about learning another language.
- d) Because the vocabulary of Esperanto is developed from many other languages, and because of their contacts with other countries, they become interested in other languages, other peoples, and in world geography.

Unfortunately, however, although they are eager to do so, they have not been able

Daŭrigo sur paĝo 9



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

ARIZONA

La kulturbulteno *Arizona Suno*, post unu numero, nun havas abonantojn en 25 landoj sur kvin kontinentoj. La dua numero enhavas artikolojn pri: Ambaŭ-Nogalesoj; malapero de burdoj sur malsupra Kolorado-rivero; Page, Arizono; arizonaj "plagbirdoj" en San Diego; Carlos de la Fuente, knabo-gajninto de tutlanda geografiscia konkurso; Londona Ponto ĉe Lago-Havas-Urbo; Ruby, la elefanto-pentristino ĉe la bestogardeno de Phoenix; kaj prizonanoj, kiuj helpas al blindaj geinfanoj. (laŭ raporto en *Arizona Stelo*, aŭgusto, 1991)

CALIFORNIA

Sabate la 17an de aŭgusto 23 esperantistoj kaj gastoj ĉeestis piknikon apud la Lago Merritt en Oakland. Kvankam la vetero malvarmis kaj iom ventis, la etoso inter la ĉeestantoj estis agrabla. Oni pridiskutis gravajn aferojn, ekz. la ĵus okazintajn kongresojn de ELNA kaj UEA, la E-kursojn ĉe San Francisco State University, novajn kaj malnovajn Esperanto-eldonaĵojn, ktp. (laŭ raporto en *La Orient-Ekspreso*, septembro 1991)

La 17an de septembro komenciĝis 15-semajna kurso por komencantoj en San Diego. La kurson instruas Frank Helmuth, Estrarano de ELNA, kaj Ellie Stein, aktuala Prezidanto de la Esperanto-Klubo de San Diego, kun helpo de Roberto Holland, Charlotte Kohrs, Victor Munson, Gloria Helmuth, Alberta Casey, Dena Frost kaj Helen Burke. (laŭ la *Novajletero* de la EKSD)

NEVADA

Komence je la 9a de septembro Christopher Nelson kaj Natalie Sera instruas komencgradan kurson ĉe Truckee Meadows Popola Lernejo en Reno. La klasoj okazas lundojn, de la 7a ĝis la 9a pm. Chris informas, ke ili uzas la "Ĉe-eston" metodon por instrui. (laŭ *La Orient-Ekspreso*, septembro 1991)

NEW JERSEY

La 16an de junio oni okazigis Esperanto-piknikon ĉe la hejmo de Jack Burwell en Nutley, NJ. Partoprenis pli-malpli 25 geesperantistoj el la Esperanto-Societo de Novjorko. Post ludoj kaj sufiĉe plena manĝo, oni aŭskultis diversajn prezentaĵojn kaj kantadis kun gitara akompanado. (laŭ raporto de Adolph Fuerst en *Novjorka Prismo*, septembro 1991)

NEW MEXICO

Inter la 11a kaj 12a de majo okazis Senkrokodiliga Semajnfino en Albuquerque. La gastigantoj estis Alice kaj Harlan Van Camp; la programon aranĝis kaj la ludojn estris Dorothy Stermer kaj Derek Roff. La raportinto, William O'Ryan, spertinte kelkajn tiajn ĉiujarajn semajnfinojn, memorigas, ke tia semajnfino "estas belega oportuno por ĉiu. Al lernanto ĝi ofertas bonan bonhumoran societan oportunun plibonigi sian lingvokonon kaj interkonatiĝi kun aliaj. Al pli spertaj parolantoj, aldone al la oportuno plifluigi, ĝi ofertas oportunun teni kaj profundigi siajn kontaktojn kun aliaj." (raportis William O'Ryan kaj Edveno Grobe en *Arizona Stelo*, aŭgusto, 1991)

NEW YORK

Dum la somero la Esperanto-Societo de Novjorko gastigis plurajn eksterlandajn esperantistojn. Inter tiuj troviĝis: Matti Lahtinen el Finnlando, studento pri matematiko; Wolfram Weber el Germanio, stevardo por Lufthansa; Georgios Koreksenidis el Grekio, kiu vizitis Usonon por kuraciĝo; Gonzalo Bermudez el Kolombio, kiu nun instruas lingvojn en mezlernejo en Albany, NY; Michel kaj Arlette Duc Goninaz el Francio, kiuj vizitis Usonon por instrui Esperanton en San Francisco; kaj Paul kaj Mirielle Denis el Francio, kiuj vizitis Novjorkon kun turisma grupo. (laŭ raporto de Nancee Medrano en *Novjorka Prismo*, septembro 1991)

PASOJ

† BELINFANTE †

D-ro Frederik J. Belinfante, emerita Profesoro de Fiziko, forpasis je la 5a de junio, 1991. D-ro Belinfante estis ano de ELNA kaj de UEA dum multaj jaroj, kaj post sia emeritiĝo kaj translokiĝo al Gresham en Oregonio li fidele servis kiel la Delegito de UEA en tiu urbo, kaj ankaŭ kiel Fakdelegito pri Fiziko.

† BOGDAN †

Sylvia Bogdan, plurjara ano de ELNA kaj la Ligo de Orient-Golfaj Esperantistoj, post longa malsano forpasis en julio ĉe la hejmo de la filo en San Bruno, CA. Sylvia estis ne nur

kompetenta esperantisto sed ankaŭ kapabla poetino, kiu verkis kaj en la angla kaj en Esperanto; kelkaj el ŝiaj strofoj troveblas en la ĵus aperinta *Literatura Suplemento*.

† BRINK †

Ni estas lastatempe informitaj pri la forpaso de s-ano Dirk Brink, dumviva ano de ELNA kaj Delegito kaj Fakdelegito de UEA en White River, Transvaal, Sudafriko. Dirk estis longtempa esperantisto, kiu dediĉis grandan parton de sia vivo, ankaŭ en Azio, al la Esperanto-movado.

† DINNEL †

Julie Dinnel (1908-1991), longtempa esperantistino en Sacramento, CA, forpasis fine de julio 1991. S-ino Dinnel lernis Esperanton antaŭ multaj jaroj. Ŝi estis dumviva ano de ELNA kaj UEA kaj multjara delegito kaj fakdelegito pri tost-proponado en Sacramento. Ŝi ankaŭ aktivis en la San Francisco Esperanto Regional Organization. Ŝia lasta esperantista ago estis, persone partopreni en la nacia kongreso de ELNA en Raleigh.

† GIDEON †

Lastatempe forpasis ELNA-ano s-ano George D. Gideon de Decatur, Alabama.

★ GLOSSOP ★

Prof. Ronald Glossop de la Sud-Ilinojsa Universitato (Edwardsville), ano kaj iama Estrarano de ELNA, estas elektita Vic-Prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Kvankam la ĉefa fako de Prof. Glossop estas Paco-studoj, lia kromfako estas la instruado de Esperanto al dotitaj kaj talentohavaj infanoj. Estis li, kiu instigis la donacadon fare de ELNA-anoj, kiu ebligis partoprenadon de infanoj de la Talento-projekto en lastatempe tutmonda konferenco pri tiaj infanoj en Nederlando. En ILEI Prof. Glossop ankaŭ kunlaboros kun la Prezidanto de la Ligo, Stefan MacGill de Hungario, en la Komisiono "UN Jaro de Familio 94".

★ GROSSMAN ★

En junio okazis por la naŭa fojo la Ludoj por Maljunuloj de la Ŝtato de Novjorko, ĉe la Ŝtata Universitato de Novjorko en la urbeto Cortland. Alvenis proksimume 1 500 partoprenantoj el 53 el la 60 regionoj de la

Daŭrigo sur paĝo 5

EL LA CENTRA OFICEJO

Lingvo-lernado kaj...

Ĉar tiu ĉi numero estas plejparte pri edukado, ankaŭ mi volas skribi pri tiu temo. Pli specife, pri rimedoj por lerni Esperanton. Mi mencias nur kelkajn problemojn kaj sugestojn rilate al la haveblaj rimedoj. Leteroj kiujn mi ricevis de membroj de ELNA atentigis min pri la problemoj; espereble aliaj membroj aŭ legantoj deziras solvi ilin.

Esperantistoj ĉiam diras, ke Esperanto estas pli facila ol aliaj lingvoj. Post nur kelkaj monatoj de lernado, ekzemple, oni povas paroli Esperanton tiel bone kiel persono parolas alian lingvon kiun li studadis dum pluraj jaroj. Sed eble ĉar Esperanto estas pli facila, oni povas forgesi pri la malfacilaĵoj kiujn komencantoj spertas. La lernanto de alia lingvo havas plurajn avantaĝojn, eĉ se la lingvo mem estas pli malfacila. Klasoj, instruistoj, kaj lerno- kaj legolibroj abundas; en multaj usonaj urboj la lernanto povas paroli kun denaskaj parolantoj kaj eble eĉ kapti televidajn kaj radiajn dissendojn en la lingvo.

Por la lernanto de Esperanto la afero estas alia. Ne estas multaj instruistoj aŭ klasoj, ofte estas malfacile trovi parolanton de la lingvo, ktp, do ofte la solaj rimedoj kiujn la komencanto havas por lerni la lingvon estas libroj. Unue oni uzas lernolibron, poste legolibron.

...Legolibroj

Mi ricevis leteron de progresanto. Li

estis kontenta pri la lernolibro kiun li uzis, sed li plendis pri la haveblaj legolibroj. La legolibro kiun li uzas, kaj aliaj kiujn li vidis, havas tro longajn legaĵojn, kaj ne havas vortprovizon sur la sama paĝo, aŭ eĉ je la fino de la libro. Ĝenas lin provi tralegi longan legaĵon kaj samtempe serĉi la signifon de multaj vortoj en vortaro. Pro tio li perdas intereson pri Esperanto. Li preferus havi mallongajn, simplajn legaĵojn kun sampaĝaj vortprovizoj. Eble vi ne konsentas, kaj sendube la kompilintoj de legolibroj havis pedagogiajn kialojn ne aldoni vortprovizojn. Sed eble kompilintoj devus pensi pri tiu plendo. Ĉu estas sufiĉe da simplaj legaĵoj por komencantoj kaj progresantoj? Evidente Claude Piron opinias, ke ne, ĉar li verkis multajn tiajn legolibrojn por komencantoj. Sed unusola persono ne povas solvi la problemon.

...Komputiloj

Alia problemo estas tiel nova, ke verŝajne ne multaj ĝin rimarkis. Tiu kiu serĉas la plej modernan metodon lerni lingvon povas uzi komputilon. Ekzistas ĉiaspecaj softoj por lerni fremdajn lingvojn. Sed por lerni Esperanton ni havas nur la bonegan kurson de Michael Urban kaj la senpagan korespondan kurson, kiu estas havebla al komputiluzanto per modemo. Multaj usonaj esperantistoj uzas komputilojn, kaj pluraj estas profesiaj komputilistoj. Ĉu tiuj kiuj ankaŭ kompetentas pri lingvo-instruado volas

krei novajn softojn por lerni Esperanton?

...Instruistoj

Pri alia rimedo por lerni Esperanton, klasoj, mi ricevis leteron kiu enhavis bonan sugeston. Por pliiigi la nombron de klasoj, la skribintino diris, oni kompreneble devas pliiigi la nombron de instruistoj. Jen ŝia ideo por tion fari: Ofte grupo aŭ klubo de esperantistoj konas instruiston kiu volas instrui Esperanton sed kiu deziras unue plibonigi sian propran scipovon. La grupo povas helpi donacante monon por sendi tiun personon al unu el la someraj Esperanto-kursoj. Ili povas rekte donaci la monon al la instruisto, aŭ, se ili ne konas instruiston sed tamen volas helpi aliajn instruistojn, ili povas donaci al unu el la edukaj fondusoj de ELNA.

...Klasoj

Mi ofte ricevas leteron de iu kiu demandas, ĉu estas Esperanto-klaso en lia urbo. Pli ol unufoje mi respondis "ne", sed post nur kelkaj tagoj mi eksciis, ke ja okazos klaso, ĉar la Centra Oficejo ricevis mendon por lernolibroj de instruisto aŭ universitata librovendejo en tiu urbo. Por eviti tiajn misaĵojn en la estonteco, ĉu vi povas informi kaj min kaj la redaktoron de *Esperanto U.S.A.* se vi aŭ via klubo instruos Esperanton? Bonvolu informi nin kiel eble plej frue antaŭ la komenco de via klaso.

Antaŭdankon!

Mike Donohoo
Direktoro, ELNA C.O.

Daŭrigo de paĝo 4

ŝtato. En la ĵurnalo Cortland Standard de la 8a de junio aperis sur la unua paĝo longa artikolo pri la Ludoj kun foto de longtempa esperantisto Rochelle F. Grossman, kiu prepariĝis por la tenisa konkurso. Fakte, Rochelle kaj ŝia kunludantino gajnis la oran medalon en sia aĝkategorio. Bonege, Rochelle! (laŭ raporto de Nancee Medrano en *Novjorka Prismo*, septembro 1991)

† KAREL †

Nan Karel, esperantisto kaj ELNA-ano,

forpasis la 7an de julio en Port Charlotte, Florido. S-ino Karel estis instruisto de lingvoj kaj muziko en Arkanso, Misurio, Misisipio kaj Norda Karolinio, kaj ŝi instruis la francan lingvon ĉe la Ŝtata Universitato de Nordorienta Miĉigano. Ŝi estis Estrarano de la Konsilio pri Artoj kaj Homaj Temoj de la Kantono Charlotte. Postvivas i.a. la edzo Leon, al kiu ni transdonas sincerajn bedaŭrojn kaj kondolencojn.


★ SOLZBACHER ★

Lastatempe d-ro kaj s-ino William Solzbacher festis la 60-jaran jubileon de sia

geedziĝo. Ni sendas al ili niajn elkorajn gratulojn! D-ro Solzbacher, kiu estas longtempa ano de ELNA kaj antaŭe de EANA, kaj kiu estas ankaŭ ano de la Akademio de Esperanto, siatempe respondecis pri la Esperantlingvaj dissendoj de Voĉo de Usono (Voice of America) en la komenco de la sesdekaj jaroj.

† WERNER †

Ni ricevis informon pri la lastatempa forpaso de ELNA-ano James Werner de San Diego.



ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondecigi definitivajn plenumon de io ajn promesita en anonco.]

La Kultura Centro Esperantista anoncis, ke dum la somero 1991 ne okazis aranĝoj aŭ kursoj pro reorganizo kaj preparo de nova programo por pli bone servi vin en la estonteco. Nova programo aperos en novembro 1991 kaj anoncos la aktivecojn de la jaro 1992. Intertempe, oni povas daŭre aĉeti multajn librojn ĉe la KCE libroservo, kiu proponas preskaŭ 2 000 titolojn, kaj aĉeti brokantaĵojn, pri kiu disponeblas katalogo kontraŭ ses internaciaj respondkuponoj. Por informoj: Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, Poŝtfako 779, CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS, Svislando.

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo informas, ke jam aperis la ĉijara eldono de la katalogo de Pasporta Servo. Oni povas mendi ĝin kontraŭ 15 nederlandaj guldenoj de TEJO. Mendoj ekde tri ekzempleroj ricevas trionan rabaton. Adreso: TEJO, ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando.

Oy Mendoservo Ak decidis renaski la kulturalan revuon Norda Prismo. La unua numero devas aperi en la nuna aŭtuno. Antaŭplanita abonkotizo estas ĉirkaŭ 24 nederlandaj guldenoj. Por komuniki kun la redaktisto pri verkaĵoj, skribu al: Jukka Pietiläinen, Puutarhakatu 12 B 18, SF-40200 JYVÄSKYLÄ, Finnlando. Pri abonado kaj ceteraj administraj aferoj: Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, SF-05510 HYVINKÄÄ, Finnlando.

La Bonfara Spiritisma Societo de São José do Rio Preto agadas ĉe la fakoj sano, edukado, socia promocio kaj disvastigo kaj instruado de Esperanto. Ĝi ankaŭ helpas forlasitajn infanojn, oldulojn kaj necesbezonajn homojn en la ĉirkaŭurboj de São José. Por pli bone helpi tiujn homoj, la Societo intencas konstrui ian Helpo-Organizaĵon kiu inkluzivos spiritisman Regionan Hospitalon, Spiritisman Edukadan Institucion kaj diversajn aliajn helpajn aktivecojn kiuj celos la socian promocion de la homo. Se interesus vin kontribui, kontaktu: Sociedade Espirita de

Beneficencia, Av. Octavio Luiz de Marchi 333, Caixa Postal 126, 15.035—SÃO JOSÉ DO RIO PRETO—SP, Brazilo.

Oy Mendoservo Ak en Finnlando atentigas pri la senfundaj merkataj eblecoj en la "sovetiaj" baltaj landoj, precipe en Estonio, kaj proponas al usonaj investemuloj diversajn investeblecojn laŭ difinita programo. Oni devas investi minimume egalvaloron de ĉ. \$1 000, kiu sumo povas sufiĉi eĉ por 50%-a akcikapitalo en la priinvestita firmaeto, depende de la fako. Estas granda risko de perdo, sed ankaŭ grandaj profiteblecoj, precipe okaze de sendependiĝo de la baltaj ŝtatoj. Por informoj pri tio, skribu al: Lasse Kivistö, Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, SF-05510 HYVINKÄÄ, Finnlando, tel. (990 914) 800 54.

En Krakovo, Pollando, oni malfermas novan Centron pri Orienta Medicino UMEA SHINODA-KURACEJO omaĝe al d-ro Hideo Shinoda, jam forpasinta Honora Prezidanto de la Universala Medicina Esperantista Asocio. En la Kuracejo oni aplikas metodon de s-ro Masayuki SAIONJI Orientan Specialan Diinan Masaĝon, ankaŭ akupunkturaron, ĉinan masaĝon, klasikan masaĝon kaj aliajn. Por pliaj informoj: UMEA Shinoda-Kuracejo, ul. Centralna 32, 31-586 KRAKÓW, Pollando, tel. (48) 44-67-00 w. 17.

Oni povas ricevi tutan kompletan de la anglalingva versio de la revuo Soveta Uzbekistano kun la Esperanto-rubrikaro, konsistantan el ĉ. 20 revuoj, pagante nur la koston de la sendo. La tuta kompleto pezas ĉ. 2 kilogramojn. La pripagan sumon oni bonvolu sendi al UEA, konto uzbk-y. Oni ne nur ricevos senpage la originalan kaj produktivan Esperanto-kurson, sed ankaŭ povas ekscii pri malproksima lando, situanta sur la iama Silka Vojo. Petu la kompletan, kaj informu pri pago al la UEA-konto, ĉe: E.S. Perevertajlo, ab/k 140, Poĉtamt, SU-700000 TAŠKENT, Uzbekio, Sovetunio.

Esperantisto en Uzbekio pretas akcepti gaste en sia hejmo por 2-3 semajnoj ajnan esperantiston el Usono aŭ el aliaj landoj. La gastado estas senpage. La reciproka gastigo estas ebla, sed ne nepara. Por informo kaj aranĝado, kontaktu: E.S. Perevertajlo, ab/

k 140, Poĉtamt, SU-700000 TAŠKENT, Uzbekio, Sovetunio.

Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj (AEH) aranĝos de la 18a ĝis la 25a de julio 1992 la Unuan Mondkongreson de Esperantistoj-Handikapuloj en fama banurbo Frantiskovy Lázně, Ĉeĥoslovakio, kie estis konstruita en la jaro 1914 la unua en mondo monumento de d-ro L. L. Zamenhof. Limdato por aliĝo: 31a de decembro, 1991. Informojn petu kaj provizorajn aliĝojn sendu al: Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj, p.k. 63, 274 01 SLANY, Ĉeĥoslovakio.

La dana urbo Næstved, kiu situas 90 km sude de la ĉefurbo Kopenhago en idilia pejzaĝo, eldonis Esperantlingvan enmetaĵon al la urba turisma broŝuro. Mendu ĉe Turisma Oficejo, Købmagergade 20 A, DK-4700 NÆSTVED, Danlando.

Sufiĉas sendi poŝtkarton al la redakcio de "Heroldo de Esperanto" por senpage ricevi ekzempleron de la duobla numero de la gazeto kun ilustrita raporto pri la U.K. en Bergeno. Kiel ĉiuj scias, la grand-formata "Heroldo de Esperanto"—abonebla ankaŭ ĉe ELNA—fondita en 1920, de pli ol 70 jaroj estas la plej ofte aperanta kaj la plej populara internacia periodaĵo en la lingvo de Zamenhof. Adreso de la redakcio: Heroldo de Esperanto, Via Sandre 15, I-10078 VENARIA REALE (To), Italio.

La Internacia Informa Sekcio de la Pekina Esperanto-Asocio volonte kunlaboros kun internaciaj, landaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj kaj personoj, kun elektronikaj kaj aliaj entreprenoj, institutoj kaj asocioj por antaŭenpuŝi la Esperanto-movadon kaj akceli la interŝanĝon de elektronikaj teknikoj kaj aliaj inter Ĉinio kaj aliaj landoj de la mondo. Seriozaj kunlaboremuloj povas ricevi detalojn de: s-ro ZENG Heyao, P.O. Box 1089, CN-100034 BEIJING, Ĉinio, tel. (86 1) 6013633.

La Pekina Esperanto-Asocio kune kun la Ĉina Tutlanda Komitato de UNESKO kaj entute sep aliaj unuoj decidis okazigi la Unuan Pekinan Internacian Simpozion pri Aplikado de Esperanto en Pekino de la 9a ĝis la 15a de majo, 1992. Post la Simpozio okazos almenaŭ kvin turismaj ekskursoj al diversaj partoj de Ĉinio. Por informoj kaj tarifoj: Organiza Komitato de 1-a PISAE, ĉe PEA, P.O. Box 1089, CN-100034 BEIJING, Ĉinio, tel. (86 1) 8412132.

SFSU: 1991

by Reginald Jaderstrom

[Reg Jaderstrom, a long-time and very competent Esperantist—you have read some of his book reviews in this magazine—will be in charge of the teaching team at San Francisco State University Summer Esperanto Workshop in the summer of 1992.]

I attended the 22nd (1991) Esperanto Courses at San Francisco State University and came away from the three weeks satisfied that I increased my skill and knowledge in the language.

This year the three professors were Jim Cool of Ohio, Michel Duc Goninaz of Aix-en-Provence, France, and So Gilsu of Seoul, Korea. As usual, there were four levels of courses: **Baza** (beginning), **Postbaza** (Intermediate I), **Mezgrada** (Intermediate II), and **Supera** (Advanced). In addition, there was a one-credit **Metodiko** (Teaching Methods) course, which was squeezed into the lunch hour.

The three took turns teaching each of the classes. The in-class time was divided about equally. For 1 1/4 hours each day we met with one professor, and then an equal amount of time with another. This continued over the three weeks so that we had about the same amount of exposure to each one. We also had the option to sit in on other classes, so that it was possible for us each to have five to six hours of class time per day.

I enrolled in the Supera course, with 11 participants officially registered. The content of the course varied. So Gilsu generally led discussions that focused on Asian philosophies and their differences from European-based concepts. (We also got into the habit of saying Asian and European rather than the more ethnocentric East and West.) In addition, we read and discussed some of the basic Zamenhof documents.

Michel Duc Goninaz concentrated on poetry of the Budapest School, with excerpts from *Esperanta Antologio*. We read from Kalocsay, Baghy and others. I personally gained some new skills in analyzing not only the formal structure of individual poems but their content as well. It would be hard to come away from this still thinking that Esperanto has no culture.

Jim Cool concentrated on translations. Most of us selected one story each from the book *Sudden Fiction*. Those not from the

U.S. were able to choose other stories. We had the chance to listen to, read and critique stories from Australian and French literature. I worked on a short story by Ray Bradbury, which I had previously hoped to translate anyway.

The Metodiko course had two focuses: Duc Goninaz discussed problems presenting and ingraining syntax, and different ways of doing grammatical description. So discussed *interference* from other languages and within Esperanto itself. He asked us to compile specific examples that he could use in the future. My own report was on interference from Cantonese and English.

Other classes had conversation exercises as well as various reading and writing assignments. In addition, there were opportunities to practice conversation and listening skills at mealtime in the City Eats cafeteria. Further chances came through immersion in the other activities described below.

Our unofficial fourth professor was John Mathews of Sacramento, who for the third consecutive year volunteered his time and computer for producing a daily Bulteno. We had three official reporters, and others of us also contributed various brief articles from time to time. Meeting deadlines was often stressful, and John and others worked into the late evening and even past midnight. It was still not possible to catch all typos before going to press.

John also promoted the Speechcraft (Parolmetio) program, based on the Toastmasters format. We were finally able to schedule eight sessions in the late afternoon, with seven or eight regular participants. With this practice we were able not only to improve our oral fluency in Esperanto, but learned skills usable in general speech organization as well.

Derek Roff and Dorothy Stermer again came from Albuquerque to handle general extracurricular arrangements. There were evening programs about five times a week. Most of these were presentations by the professors or one of the students. Among them Professor So talked about his travels, including those in Cuba last year.

After presentations or on free evenings, Elizabeth Hicken and others led folk dancing and singing. And then there were various spontaneous and semi-spontaneous activities created by the students them-

selves.

There were also two traditional Sunday garden parties hosted by local Esperanto groups: one by the San Francisco Esperanto Regional Organization (SFERO) at the home of Cathy and Bill Schulze, and the other by the League of East Bay Esperantists (LOGE) at the home of Lusi and Bill Harmon. LOGE also hosted a hike at the side of Mt. Tamalpais; and there was also the traditional visit to the Central Office of ELNA before the Harmon party.

Among the approximately 50 students were some who participate every year or nearly so, others who have come two or more times, and still others who enrolled for the first time. Participants from outside of the U.S. came from Canada, Mexico, Japan, Korea, Australia and Finland. Arlette Duc Goninaz accompanied her husband from France. In the second week we were visited by Regina Grzebowska and her sons Andreo and Romeo. She is one of the directors of Esperantotur, based in Bydgoszcz, Poland. There were also intended students from Costa Rica and China who were unable to get visas to participate.

A surprise new Esperanto speaker was Professor Vito di Gregorio from Bari in Southern Italy. He brought a group of young students to study English, and they also lived in Verducci Hall. With his knowledge of several languages, he readily understood and picked up Esperanto. At one point he purchased a textbook and dictionary and was soon able to carry on basic conversation with little error. He played the piano for us at our graduation ceremony the last Thursday night.

Several course members commented favorably about the vitality of the Esperanto movement in the U.S. One person said he wished there were a similar situation in his own country.

The favorable impressions and the success of these various events resulted from a combination of three semi-independent factors: an intensive set of courses, proximity of the Central Office, and the relatively large number of active Bay Area Esperantists. Let us hope that eventually there will be similar sets of circumstances elsewhere in the U.S. and the world in general.

REPORT FROM THE HAGUE, AUGUST 1991

by Ronald J. Glossop

[Prof. Ronald J. Glossop of the University of Southern Illinois at Edwardsville here reports on an affair to which a number of ELNA members contributed financial support. In his letter accompanying this article, he again indicated his wish to express his thanks to the many who helped this project.]

August 1, 1991 was a big day for Esperanto at the Ninth World Congress for Gifted and Talented Children in The Hague, The Netherlands. In the morning presentation Dr. Ronald Glossop, Professor of Philosophical Studies at Southern Illinois University at Edwardsville, reviewed what is already being done with regard to teaching Esperanto to children and displayed available materials. To show what is possible he briefly interviewed three children from Budapest who had studied Esperanto for two years in a special class sponsored by the Talento Foundation. Then Glossop taught the audience a bit of Esperanto by getting them to join in singing "Ruĝa Pomo" from the tape of songs produced and distributed by "Children around the World" in San Diego.

The two-and-a-half hour afternoon symposium featured ten Hungarian eight-year-olds displaying their knowledge of Esperanto as well as their skill in using the soroban, a traditional Japanese abacus. András Lukács, General Secretary for the Talento Foundation, spoke briefly about its program before introducing the children. The children, taught by third-generation Polish Esperantist Esperantina Mirska, showed how they study Esperanto and answered questions from the audience. One less-than-sympathetic listener asked one of the girls what she expected to be able to do with a little-used language like Esperanto, but the girl quickly replied that she would use it to travel throughout the world. The children were accompanied by teachers, parents, a TV photographer, a journalist, and two bus drivers. Their trip was organized by Lukács and coordinated in the Netherlands by Dutch Esperantists Marjet Erasmus-van Zadelhoff, Gerrie van Geffen, and

Edwin Burg. On Monday, August 5, the Hungarian children gave another demonstration about Esperanto and use of the soroban for the general public at a school in Voorburg, a suburb of The Hague.

children teach Esperanto to children. This tape shows one group of children singing Charlotte Kohrs' Esperanto songs and another group making use of her new geography-oriented book *Ni Esploru la Mondon*.

An unanticipated plus for Esperanto was a press conference during the three-hour period between the two presentations arranged by Mr. F. Winkel, mayor of the nearby suburb of Noordwijkerhout. He spoke to the journalists in Dutch about the importance of Esperanto and then introduced Dr. Glossop to tell them (in English) about the visit of the Hungarian children and the desirability of teaching Esperanto to children all over the world. During the question-and-answer session Glossop argued that the European Community needs a single language and that it should be Esperanto, not English.

Mayor Winkel had also displayed his support for Esperanto the previous week. The World Association of World Federalists was holding its week-long congress in Noordwijkerhout, and Mayor Winkel gave his welcoming address in Esperanto. This was particularly significant because Professor Glossop had urged the World Federalists to give more support to Esperanto in his address just the previous day.

The idea of making a presentation about teaching Esperanto at the Ninth World Congress on Gifted and Talented Children was first proposed by Professor Glossop to the Organizing Committee two years ago. He had given a presentation proposing that gifted children around the world use Esperanto to correspond with one another at the Seventh World Conference in Salt Lake City in 1987. That presentation was published in *Gifted International*, the organ of the World Council, in 1988. He was not able to attend the 1989 conference in Sydney, Australia, but thought that a meeting in The Netherlands would be a good place to again bring Esperanto to the attention of this organization.

Glossop was getting only a negative response until Willy Peters, Secretary of the Local Organizing Committee for the conference, saw the Hungarian students

DONACINTOJ AL FONDAJO TALENTO

Anonima
Beatrice Acers
John & Janice Atkinson
Marion Bigelow
Roger E. Blaine
Allan C. Boschen
Joseph Carson
Duncan Charters
Prenda E. Cook
Roy Coutinho
Dr. Sidney S. Culbert
Armin F. Donets Sr.
S-ino Ellen M. Eddy
Esperanto Societo de Alasko [Mem.
Eldred Olsen]
Esperanto Soc. of Chicago
Jim Faughnan
June Fritz
Mary J. Gibson
Ges-roj T. Goldman
Rochelle F. Grossman
Charles M. Hall
Lucy & Bill Harmon
Dorothy B. Holland-Kaupp
Audrey Janisen
Ben Keh
Maya Kennedy
Les kaj Arlyn Kerr
Charlotte Kohrs
Pauline Ledeen
Irene Leland
Roberta McFarland
Stevens T. Norvell Jr.
Janet Novak
Bonnie Parsons
H. Elwin Reed
Thomas S. Reed
Steven Rinker
Catherine L. Schulze
Bill & Phyllis Shanks
Lou & Ellie Stein
Robert A. Swenson
Dr. Humphrey Tonkin & Jane Edwards
Dr. Pierre L. Ullman
Gerald T. Veit
Bern Wheel
Dori Vallon Wheeler
Glenn R. Williams

The afternoon symposium, introduced by Professor Glossop's talk on why the world community needs Esperanto and why children need Esperanto, also featured a new videotape from "Children around the World" in which

make their presentations at a European Conference on Higher Aptitude in Budapest last October. He invited them to attend the conference in The Hague, but offered no financial support for doing that. Glossop began an effort to raise money from North American Esperantists to finance the trip. The generous contributions exceeded the \$1500 needed to pay for the transportation, so Glossop was also able to pay the \$95 one-day registration fee required for Lukács to participate in the conference as well as contributing \$100 to "Children around the World" for its videotape.

The support from Esperantists in The Netherlands was more than anyone could have anticipated. They arranged for housing and meals and entertainment and publicity, even though the conference in The Hague was scheduled during the same week as the Universala Kongreso in Bergen, Norway. They even supplied large posters to publicize the symposium about Esperanto.

The great disappointment was the small turn-out from the 600 persons

attending the conference. Only eight attended the morning presentation and about ten the afternoon symposium. (The room was certainly not empty because 16 parents and the others from Hungary were all present.) But there were ten other simultaneous symposia, a couple of which were being conducted by well-known leaders of the World Council, so the competition for an audience was intense. Unfortunately, only a few journalists attended the press conference called by Mayor Winkel. Nevertheless there were stories in at least four Dutch newspapers as well as media coverage in Hungary. Thanks to the large posters, even those who did not attend knew that a session about Esperanto was being conducted. Also in another session several of the persons who had accompanied Professor Glossop on the April 1991 trip to visit schools for the gifted in Moscow, Novosibirsk, and Budapest spoke favorably about Esperanto. In fact, one teacher in the audience was so impressed that she agreed to work with Glossop to put together a session on teaching Esperanto to non-

English-speaking immigrant children at the 1993 World Congress to be held in Toronto.

An Esperanto seminar will be held at the annual Modern Languages Association at noon on Dec. 30 in Suite 41 of the Marriott Hotel, in San Francisco. Presentations will include: "Esperanto as a Romance Language (Paul M. Lloyd, University of Pennsylvania); "The Growth of the Culture of Esperanto and the De-Centering of the Culture of English" (Pierre Ullman, U. of Wisconsin-Milwaukee); and "Machine Language Translation, Using Transformational Linguistics with Esperanto as an Intermediate 'Bridge' Language" (Myron Bondelid, California Lutheran University).

Daŭrigo de paĝo 3

to correspond with classes in other places as much as I'd hoped. One reason is that each year, most of my students are beginners, needing more assistance in writing letters than I've been able to provide. See also #4 below.

2. We have welcomed opportunities to work with others in the United States:

- a) We have been in close touch with Esperantists in this country who are teaching Esperanto to children in public schools, in particular Martha Flores in Washington, DC, Ronald Glossop in Edwardsville, MO; and also, recently, with R. Kent Jones in Chicago who is using our song booklets and geography booklets in his Esperanto workshops and courses for Chicago teachers.
- b) In response to an article, "Does Anyone Here Speak Esperanto?" by Michelle Quick in the May/June 1989 issue of the magazine, *GIFTED CHILD TODAY*, we have received over 20 letters from elementary school teachers or supervisors of programs for gifted children, requesting our book, *LET'S*

TALK AROUND THE WORLD.

With each book we sent a letter, offering further help and referring the teacher to ELNA for further information and materials. Three have written us since.

